3-a JARO, N-o 39 APERAS MONATE JANUARO 1936

# SUR POSTENO

OFICIALA ORGANO DE INTERNACIO DE PROLETA ESPERANTISTARO

REDAKTEJO-ADMINISTREJO : Bourse du Travail, 14, rue Pavée — NIMES (Gard) — Francio.
IPE-Oficejo : K-do S. J. SMITH, 36 Womersley Road, LONDON (Britio).
IPE-Centro : K-do H. HOMO, Postbox 305, LENINGRAD (U S S R).
Internacia PEK-Centro : K-do B. TURNER, Dundeestr. 60, EDINBURGH (Britio).

## Oficialaj Informoj de IPE-Sekretariaro

*Pri provizora transporto de IPE-O*

Pro oficialaj malhelpoj, ne dependaj de ni, la IPE-O ne plu funkcias laŭ la malnova adreso. Bonvolu de nun, ĝis revoko, kun ĉiuj administraj k ligaj aferoj vin turni nur laŭ la nova adreso: K-do S. J. Smith, 36, Wormersley Road, *London 8* (Anglio).

*Pri transporto de redaktejo k abonejo de SP k de EKRELO-librejo.*

Ĉiujn informojn k artikolojn por SP, *abonpagojn* por SP k mendon por *Ekrelo*-literaturo bonvolu direkti de nun laŭ la adreso : ' ' rue Bachalas, *Nimes* (Gard) — *Francio.*

*La IPE-C funkcias same, kiel antaŭe.*

Gia adreso restis : *Leningrad I*, Postbox 305, ~~USSR — H. Homo.~~

Pri ĉiuj organizaj k principaj demandoj turnu vin al IPE-C.

*Pri internacia PEK-Centro.*

Laŭ decido de la 2-a IPE-kongreso IPC ekfunkciis. La IPE peras la necesajn adresojn, materialojn k donas konsilojn pri la aranĝo de PEK-bultenoj k organizado de peresp-a lab. korespondado.

La PEK-fako de IPE-C pro tio likvidiĝis.

*La adreso de IPC estas* : K-do Bert Turner, 60, Dundeestr., *Edinburgh*, Britio.

*Pri la aperado de S. P. I.*

La malfacila situacio en kiu troviĝis SP. en la jaro malgraŭ ĉiuj streĉoj ne pliboniĝis. La kaŭzo estas, ke en diversaj sekcioj k UK-oj oni ne mobilizis ĉiujn niajn k-dojn k amikojn por aboni al SP.

La 2-a kongreso de IPE rekomendis al ĉiuj IPE-anoj nepre aboni SP k devigis ĉiujn sekciojn k UK-ojn klopodi pri tio. Bedaŭre ĝuste en niaj grandaj sekcioj ekz. FEP k BLEA la abonado ĝis nun ne progresis sufiĉe.

Tial la situacio devigis nin provizore ĉesigi la aperigadon de SP.

Gek-doj ! La plua sorto de SP dependas de vi. Se almenaŭ 50% da IPE-anoj abonus sian organon — sian informilon k propagandilon, tiam SP tute facile aperus. La sekcioj k UK-oj, ĉiuj niaj aktivuloj al batalo por SP !

LASTHORE

Ni interkonsentis kun la franca sekcio de IPE pri disponigo de parto de ĝia organo « *Proleta Esp-isto* » al materialo de SP. Tiu materialo aperos en formo de informilo aldona al « *PE* »

Tiu informilo estos dissendata al ĉiuj SP-abonantoj dum la tempo de neaperado de SP.

*Pri la Literatura Fako de IPE-C.*

Por forigi miskomprenojn, kiujn ĉe kelkaj k-doj kaŭzis la ekfunkciado de la Litfako ni klarigas : ĝi ne estas iu nova organizo de proletaj esp-aj verkistoj konkurenca al IAREV, sed nur organizanta fako de IPE-C. Gia tasko estas observi k instigi la eldonagadon de Ekrelo k la tradukadon aŭ verkadon de facillingvaj valoraj verkoj : socipolitikaj, sciencpopularaj k beletraturaj. Tiucele ĝi arigas kunlaborantojn inter la traduk- k verkkapablaj IPE-k-doj, diskutas kun ili pri la eldonaferoj, laŭeble helpas en ilia laboro, ktp···

IAREV kontraŭe estas fakte *sendependa organizo* de ĉiuj rev. espo-verkistoj, membroj de plej div. esp. organizoj, kies celo estas speciale k precipe akceli la kreadon de originala *progresema espo-literaturo beletristika*. IAREV estas amika al ni organizo, kiu plenumas valoran taskon, tial ĉiuj IPE-anoj-verkistoj devus aliĝi k aktive kunlabori al IAREV.

## La veraj principoj de unueco

La okazintaj IPE- kaj SAT-kongresoj 1935 demonstris la volon de la laboristaj esperantistoj aliĝi al la granda unueciga movado de l'tuta laboristaro.

La plimulto el ili konsentis pri tio, ke per unueca fronto de komuna agado, serve al la antifaŝista k antimilita movado, la laborista esperantistaro ne nur grandigos sian valoron kaj influon sed ankaŭ preparos la bazon por unueca tutmonda organizo.

IPE faris k faras sian eblon por la unueco. — Per ĝia iniciato kreiĝis unueca agado en apartaj lokoj de Francio (Parizo) k Anglio (Sheffield). Gi invitis ĉiujn laboristajn esp. organizojn partopreni egalrajte la duan IPE-kongreson por akceli unuectraktojn k speciale gastigis la SAT-delegacion. Gi proponis al ĉiuj lab. esp. organizoj unuecan agadon k devigis siajn sekciojn efektivigi ĝin kiel nur eblas.

Eĉ objektivaj atestantoj, kiel la pola revuo « *Internacia Lingvo* » konstatis en sia novembra n-ro, ke IPE forĵetis en sia prounueca klopodo ĉiujn konsiderojn pri prestiĝo. Jes k ni estas pretaj oferi pro la unueco ankoraŭ pli, ĉar ĉiu el la organizoj, kiuj *sincere* deziras unuecon devos cedi parton el siaj antaŭaj starpunktoj.

Ni scias pri la volesprimo de la Pariza SAT-kongreso, kiu esence koincidas kun niaj ideoj pri unueco k atendis, ke baldaŭ ekestus iuj konkretaj rezultoj en la intertraktoj kun PK. de SAT. Kun des pli granda miro la lab. esp-istoj konstatos el la respondoj de la SAT-direkcio, ke la IPE-propono « ne povas formi bazon por intertraktado ». (Vidi la kune publikigatan leteron de SAT-direkcio).

Ni memorigu pri la ĉeno de argumentoj, kiuj sinsekve metiĝis kiel kvazaŭa baro par la intertraktoj.

Antaŭ la Pariza SAT-kongreso, la moto estis : antaŭe organizan unuecon — poste unuecan agadon. La Pariza kongreso tamen esprimis la deziron de unuecamikoj-SATanoj komenci per tio kio *unuigas* k ne disigas, nome per la *komuna servigo k disvastigo de esp-o* serve al la antifaŝista k antimilita bataloj, per tio kio estas laŭdeva tasko de *ajna* lab. esp-isto !

Tamen troviĝis alia argumento. La serva per esp-a laboro ja estas bona, sed ĝin nur povas utile fari la apartaj politikaj frakcioj ĉiu por si men ; neniel komuna agado, k tio koncernas same la organizadon de kolektiva laborista korespondado kiel la eldonon de informbultenoj kun laborist-korespondа materialo (PEK-bultenoj). Tio estas profunde malĝusta k disiga principo. Per tio oni volas aserti, ke ekzistas multaj veroj. Sed ekzistas nur *unu vero* komuna por ĉiuj. Kaj ĉu iu kredos, ke grupo da laboristoj en iu laborejo, kiu helpe de lab. esp-istoj korespondas kun laboristoj en aliaj landoj, skribante pri siaj propraj travivaĵoj k impresoj ne povas *komune korespondi* kvankam en tiu grupo ekzistas diversaj partianoj k plimulto de senpartiuloj, ne povas sciigi al siaj klasfratoj la faktojn de l'antifaŝista k unueca batalo, la veron, kiun ili komune k solidare perceptis ? Ĉu simila materialo ne povas konsistigi la bultenojn ? Ne nur povas, sed en la IPE-praktiko jam konsistigas!

La tuta peresperanta laboro de lab. esp-aj organizaĵoj ne nur povas esti farata *unuecfronte*, sed ĝi nur havas sencon *tiel farata*. Pri specialaj servoj laŭbezone zorgu la neespistaj organizoj por helpo de siaj espistoj mem ekster la kadro de unueca lab. esp. movado !

Ni deziras unuecon ne por eternigo k kunvivado de diversaj tendencaj frakcioj en unu organizo, sed likvidon de ĉiuj frakcioj en la nomo de unueco!

Alia supraĵa argumento, volas veki la impreson kvazaŭ IPE ne deziras allasi al unueca laboro k unueca organizo ĉiutendencajn k-dojn ; tute male ! Ni nur postulas, ke iuj k-doj per la dekstra mano ne detruu tion kion unueceme faris ilia maldekstra mano, t. e. tiu kiu laboras unuecfronte devas ĉie k sincere ĉesigi la atakojn kontraŭ la diversaj organizoj k tendencoj partoprenantaj la unuecan agadon. Neniu sincerulo povas allasi ke ekz. iu frakcio de organizo partoprenanta unuecan fronton, ekster aŭ en la organizo eldonos gazeton kun atakoj k pamfletoj kontraŭ alia organizo aŭ tendenco, aŭ disvastigas tiujn.

Laste ni renkontas al argumento pri neeble aliĝi la LEA-ojn al la tutmonda unuecagado, pro tio ke la propaganda laboro por esperanto k la praktika laboro per esp-o estas kvazaŭ kiel fajro k akvo aŭ, ke SAT k la koncernaj LEA-oj estas tute fremdaj unu al aliaj, kvankam kiam ne temas pri unueco, sed pri helpo al eldono de SAT-gazeto aŭ SAT-eldonaĵoj la fremdeco vaporiĝas.

Ne, k-doj, kiu estas sincere por unueco, tiu ankaŭ stariĝu sur la tribunon k alvoku ĉiujn lab. esp-ajn organizojn k ĉiujn k-dojn partopreni al unueca agado k unuecajn intertraktojn laŭ tutmonda skalo ; postkulisa diplomatio en tiu afero nur vekos malfidon. La kontraŭa argumento despli ne valoras, ĉar la per k por esp-a laboroj estas tute interligitaj en ĉiuj landoj k estas farataj de la samaj homoj.

# Dokumentoj pri Unueco

*Por ke nia anaro havu plej klaran koncepton pri la aktuala stato de l' demando pri lab. esp-ista unueco, ni publikigas kelkajn dokumentojn pri kies enhavo la IPE-anoj k IPE-amikoj bonvolu konigi al ni sian opinion.*

## Salutletero de IPE-Sekretariaro al la Kongreso de SAT

Leningrad, la 29 de julio 1935.

*Al la XV-a Kongreso de SAT.*

Estimataj gekamaradoj !

Sendube la kongresoj de laboristaj esperantistoj en ĉi tiu jaro okazos sub la signo de diskuto pri unueco k unueca fronto.

Duono de tiu laboro jam estas farita — la plejmulto de la laboristaj esperantistoj el diversaj organizoj jam interkonsentas pri la urĝa neceso unuigi siajn fortojn antaŭ la minaco de faŝismo k milito.

Eĉ pli en la plej diversaj lokoj, en diversaj landoj ni ĝoje konstatas, kiel stariĝas la unueca fronto de l'agado inter la grupoj de IPE k tiuj de ISE k SAT.

Necesas nun efektivigi la unuecan fronton ankaŭ en internacia skalo sed ĉiu unueca fronto nur havas valoron, se ĝi baziĝas sur praktika servigo de esperanto al la proletaro — al ĝia agado kontraŭ milito k faŝismo.

La ĉefa praktika agado estus la komuna organizo de peresperanta internacia laborista korespondado en la laborejoj k organizoj de unueca fronto, eldono de laboristkorespondaj informbultenoj surbaze de peresperantaj materialoj en diversaj landoj. Utiligo de la ricevataj materialoj por mitingoj k aliaj aranĝoj de la laborista unueca fronto, ktp... kiel ni jam detale proponis al la SAT-direkcio ankoraŭ la 5. de Decembro, sed bedaŭre ĝis nun ne ricevis konkretan respondon.

La IPE-anaro atendas de Vi nun tiujn konkretajn respondojn k proponojn pri la komuna praktika serva laboro.

IPE sendube konsentos pri ĉesigo de la reciprokaj atakoj dum komuna laboro, sed ĝi komprenas sub tio ankaŭ, ke en S-lo ĉesu la atakoj kontraŭ Sovet-Unio, ĉesu la rekomendoj de sennaciista literaturo kontraŭsovetia, ĉesu la disvastigo de tiu literaturo per SAT.

Ni apelacias al ĉiuj honestaj amikoj de Sovetio, ke ili ne allasu ke en organo, kiu sin nomas laborista, aperu kalumnioj pri la patrio de la tutmonda proletaro k ĝia socialisma konstruado.

La 10-11 de Aŭgusto en Antverpeno (Belgio) okazos la 2-a mondkongreso de IPE. Sur la tagordo de la kongreso la ĉefan lokon okupas la punkto « Batalo kontraŭ faŝismo k milito k la unueca fronto ».

Por akceli la plej rapidan interkonsenton inter la diversaj organizoj de la laborista esperantistaro, ni invitis al nia kongreso 18 laboristajn esperanto-organizojn, inter ili SAT elekti delegitojn, kiuj konsiliĝu kun la kongresanoj pri la plej rapida starigo de unueca fronto.

Ni invitas do la SAT-kongreson ankaŭ elekti siajn delegitojn, kiuj vizitu nian IPE-kongreson k tie rakontu pri viaj opinioj k deziroj.

Ni deziras al la SAT-kongreso plej bonan sukceson en sincera klopodo por konkreta akcelo de la unueca agado.

Vivu la batalo kontraŭ faŝismo k milito !

Vivu la unueca fronto de agado de proleta esperantistaro !

Kun proletaj internaciaj salutoj :

*Sekretariaro de IPE* (subskribis) : H.Homo.

## Respondletero de SAT-Kongreso

Paris, 7. 8. 1935.

*Al Centro de IPE*

(Kopio sendita al IPE-Kongreso, Antverpeno)

Kamaradoj,

Ni ricevis vian leteron de la 29-a de Julio 1935 k la kongreso konsentis respondi al vi jene :

Neniam forlasinte la vidpunkton, ke la laborista esp-ista movado povas prosperi nur kiam la fortoj tiudirekte agantaj koncentriĝos, ni esprimas nian ĝojon pri la unuecemo k gratulas vin sincere.

Vi petas, ke ni faru konkretajn proponojn por la restarigo de unueco en la lab. esp-movado k ni tion volonte faras.

Sed por ke la dezirinda unueco estu ebla k daŭra, vi certe konsentos kun ni, ke necesas unue interkonsenti pri la bazprincipoj, kiuj povas garantii tiun unuecon.

Kiu sincere k celkonforme deziras la unueciĝon de ĉiuj klaskonsciaj lab. esp-istoj kun ĉiuj aliaj, vere dezirantaj la forrenverson de l' kapitalisma regsistemo k starigon de justa, senklasa k liberhava socio, respektanta la homan dignon, tiu certe konsentas, ke necesas trovi starpunkton, ebligantan al ĉiuj tiaj homoj senescepte la aliĝon k kunlaboradon en la organizo.

Vi certe ne estas politikaj analfabetoj k sekve scias, ke en la esp-movado aparte, kiel en la tuta lab-movado ĝenerale, ekzistas diversaj tendencoj : Anarkistoj, ISK-anoj, sennaciistoj, bolŝevikoj-leninistoj, celantaj la starigon de IV-a Internacio k. a. devas havi la eblon aliĝi k kunlabori en unueca organizo.

La konsekvenco de tio estas, ke tia organizo ne povas — k sekve ne devas — agnoski kiel oficialan iun ajn el la doktrinoj de la inter si disputantaj soci-politikaj skoloj.

Por klarigi per unu sola ekzemplo nian penson, ni menciu, ke en la programo de via asocio (IPE) troviĝas punkto, kiu devigas la anojn agnoski la marks-leninismon.

Ĉu ekzemple vi estas pretaj forlasi tiun malunuecigan principon ?

Aliparte, ĉu vi estas pretaj deklari tute malkaŝe k senrezerve, ke la unueciĝenda movado devas resti sendependa de ĉiu ajn premo, de ĉiu ajn politika organizo aŭ ŝtato ?

La sperto montras, ke nia movado povas bedaŭrinde kreski nur malrapide k sekve estus tute malsaĝe gvidi ĝin laŭ ŝanĝiĝema taktiko de iu ajn politika organizo.

Kamaradoj ! ne atendante vian respondon pri tio, ĉu vi konsentas aŭ ne kun niaj supraj konsideroj, ni jam faras al vi jenajn konkretajn proponojn :

1) Espereble vi konsentas kun ni, ke estas dezirinde, ke ĉiuj viaj anoj estu ĝuste informitaj pri nia starpunkto k tial ni proponas, ke vi publikigu senŝanĝe en *Sur Posteno* (Amsterdama eldono k Moskva eldono) ĉi tiun leteron, aldonante, ke ni estas pretaj publikigi en S-ulo samampleksan respondon vian.

2) Starigo de komuna aparato, celanta dsikonigi k disvendi niajn reciprokajn eldonaĵojn k jam nun interŝanĝi anoncojn pri tiuj eldonaĵoj.

3) Komunaj klopodoj eventuale fareblaj ĉe lab. organizoj por atingi, ke la esp. lab. movado ricevu pli da atento ol ĝis nun.

4) Reciproka publikigo de nomoj de perantoj en lokoj, kie ekzistas nur ĉu SAT-rondo, ĉu IPE-grupo.

5) Enkonduko de la eldonaĵoj de SAT (periodaĵoj k libroj) en Sovetion.

6) Libera korespondado individua inter laboristoj el Sovetio k la cetero de l' mondo.

Estus eble difini aliajn punktojn, laŭ kiuj ni povas kunlabori. Dume ni memorigas al vi, ke en la kadro de SAT povas efektiviĝi pere de Frakcioj, la laboro kiun vi difinis al PEK. Kaj samokaze ni rimarkigas, ke tia informa laboro perkoresponda estas des pli efika k laŭcela, ju pli la materialo proponata por presigo en nacilingvaj gazetoj estas verkita laŭ la aparta tendenco ilia. Pro tio nur samtendencanoj devas klopodi akiri k liveri tian materialon ; pro tio la Frakcioj en SAT plej trafe solvas la problemon.

En la espero, ke per komuna bonvolo k sincera unuecemo reciproka ni finfine sukcesos restarigi la esp. movadon lab-istan laŭ simila stato, kiel ĝi estis antaŭ kelkaj jaroj, ni salutas vin sennaciece k ruĝfrate.

LA PLENUM-KOMITATO de SAT
laŭ komisio de ĝia XV-a Kongreso.

*Por la komitato subskribis* : Bartelmes.

## Rimarkigoj al la respondletero de la SAT-kongreso

1) Post : Al Centro de la Internacia Proleta Esperantistaro. — Ni certe ne kontraŭas esti *internacia* esperantistaro, ĉar havas la konvinkon, ke nur la proleta internaciismo korespondas plej bone al la aktualaj taskoj de la proletaro. Tiu artifiketo neniun trompos pri tio ke ni estas la Internacio de Prol. Esp-istaro — la plej granda esp-ista organizo ĝenerale.

2) Post : celantaj la starigon de la 4-a Internacio. — La laboristaro nun batalas por unuecigo, nun temas pri kreo de unuecaj organizoj landaj k internaciaj. Nun ekzistas du internacioj la dua k la tria. Tiu kiu anstataŭ klopodi pri unuigo de la ekzistantaj internacioj klopodas fondi novan *skisman*, konscie laboras kontraŭ la unueco k estas perfidulo de la lab. klaso kun kiu honestaj laboruloj ne povas havi ion komunan. Kun tiu alo ne povas estiĝi unueca fronto. Tamen se apartaj k-doj el tiu alo deziros honeste unuecfronte kunlabori lasinte siajn skismajn klopodojn neniu forpuŝus ilin.

3) Post : devigas la anojn akcepti Marks-leninismon. — La ideoj de Marks k Lenin estas agnoskataj k sekvataj de la plejmulto de la organizita laboristaro, sur unu sesono de la terfaco ili estas efektivigataj. Tiuj ideoj ne estas malhelpilo por unueciĝo de neesp-istaj laboristoj, kial do ili subite malhelpu al la unuiĝo de esp-istoj ?

4) Post : kiun vi difinis al PEK. — Ĉi tiu propono montras nekomprenon aŭ nekomprenemon pri la grava esenco de PEK. Unue PEK ne estas partieca entrepreno, sed unuecfronta. Krome ĝi konsistas ne nur el dissendoj de bultenoj kun originalaj eksterlandaj lab. raportoj al la lab. gazetaro, sed precipe el koresponda interligigo de *neespistaj* kolektivoj en la laborejoj de diversaj landoj, cele de fortigo de senperaj internaciaj ligoj k de la internacia solidareco batala. La laŭfrakcia organizado de PEK estus tute reakcia k kontraŭa al la ekzistanta unuecfronta praktiko k tial ne akceptebla.

5) Interese kial la punktoj 5 k 6. en la originalo de la supra letero de SAT troviĝis skribitaj post k sub la oficiala subskribo de la SAT-PK. Ĉu eble la kongreso de SAT ne donis por ili sian komision k ili estas artifikaĵoj de iuj kontraŭuloj de la unueco ? Ĉiuokaze ni rimarkigu : la enporto de SAT-eldonaĵoj tute ne dependas de IPE. Ŝajne en Sovetio neniu enporto de klaskonsciaj eldonaĵoj estis malpermesita. Kompreneble se temas pri la kontraŭsovetiaj k kontraŭrevoluciaj verkaĉoj de Lanti-sennaciistoj k gazetoj kun similsencaj artikoloj neniu klaskonscia laboristo povus rekomendi ne nur la enporton en Sovetion sed eĉ ilian distribuon per iu lab. organizo, same kiel por la faŝista literaturo.

6) Tiu punkto estas tiel ne lojale esprimita, ke neinformitoj povus pensi, ke la korespondado inter laboristoj de Sovetio kun eksterlandaj ĝis nun ne estis « libera » aŭ ke ĝi tute ne ekzistis. Fakto estas ke la plej granda korespondado per espo ĝuste okazas kun sovetiaj laboristoj kun kolektivoj k ankaŭ kun individuoj. Se IPE precipe ĉiam pledas pri neceso de kolektiva korespondo por neespistaj laboristoj tio okazas pro la deziro entiri en aktivan partoprenon de pensinterŝanĝo kun eksterlandaj klasfratoj kiom eble plej da k-doj, por per kolektiva verkado pli objektivigi k riĉigi la materialon, por entiri amasojn al la internaciisma solidariga edukiĝo. Sed neniam IPE esceptigis la seriozan individuan korespondadon kiel helpilon de la kolektiva.

## Rezolucio pri la unueca laboro akceptita de IPE-Kongreso

Kongreso de IPE, aŭskultinte kun unueca volo la perleterajn proponojn de SAT, la klarigojn de ĝiaj delegitoj k la raporton de siaj kongresanoj, komisiitaj por ekzameni detale la leteron k diskuti kun la delegitoj de SAT decidas jenon :

1) La kongreso bedaŭras, ke venis neniu preciza k detala respondo al la antaŭaj proponoj de IPE kaj konstatas, ke tiuj proponoj ne estas publikigitaj de SAT, ke ili ne estas prezentitaj al kongreso de SAT k ke la delegitoj de SAT ne konas ilin.

2) Kongreso substrekas, ke la ĉefa bazo de kunlaborado k unuiĝo estas la servigo de esp-o al la laborista klaso, do ĉefe al neesp-istoj k demandas al SAT pri neta k detala deklaro pri laboro simila al PEK (informbultenoj laboristkorespondantaj esp-aj k nacilingvaj, al gazetaro k organizaĵoj, kolektiva korespondigo de neesp-istoj). IPE opinias, ke tia agado devas esti esence senpartia k koncernas ĉiujn esp-istajn laboristojn.

3) Por plifaciligi la agadan k organizan unuecon ni pretas intertrakti pri ĉiuj punktoj, kiuj povus ĝeni la unuecfrontiĝon de diverstendencaj laboristoj. Cetere en la kadro de IPE jam povas senĝene kunlabori krom la senpartiuloj la diversaj tendencoj : socialistoj, komunistoj, anarkistoj, ktp...

4) Ni akceptas ripeti malkaŝe, k senrezerve, ke la unuigenda movado devas resti sendependa de kiu ajn premo, de kiu ajn politika organizaĵo aŭ ŝtato.

5) Ni publikigos la leteron en SP, kiel ni publikigis la rezolucion de la Valencia kongreso de SAT k la akompanan leteron. Ni proponas, al SAT, publikigi per Sen-ulo ne nur ĉi rezolucion k la akompanan leteron, sed la antaŭajn proponojn de IPE-sekretariaro, kiujn SAT ne komunikis al siaj anoj.

En Moskvo ne ekzistas eldono de la centra organo de IPE, sed nur organo de SEU. Ni povas rekomendi al ĝi k al niaj aliaj sekciaj organoj publikigi tiun leteron, se SAT per Sen-ulo rekomendos al la organoj de la landaj organizoj kontraktintaj kun SAT publikigi niajn proponojn.

6) Ni proponas interŝanĝon k disvendadon de tiuj eldonaĵoj diversspecaj, kiuj povas esti konsiderataj kiel

---

Oni ne ekstaru k ne kriu, ke « nia organizo » estas la plej bona, taŭga, universaleca k unueca, do nur devas esti la bazo por la unueco. Per tio oni ne konvinkas la grandan plimulton de alipensantoj. Ja se tiaj asertoj estus agnoskataj, ne ekzistus bezono por iaj unuectraktoj !

La unueco naskiĝas en komuna batalo k laboro k kroniĝos per la forigo de apartaĵoj de ĉiuj lab. esp-aj organizoj kunfluontaj je unu granda batalantaro ! Malgraŭ ĉio !

*Amiko de Unueco.*

bonaj de ambaŭ asocioj. Ĉiu organo anoncas la de ĝi aĉetotajn k vendotajn eldonaĵojn.

7) La 3-a punkto (de la SAT-letero) estas akceptata.

8) Pro eblo de faŝismiĝo en aliaj kapitalismaj landoj k por la bono de la membraro de ambaŭ asocioj ni ne konsideras utila la publikigon de la nomoj k adresoj de niaj gek-doj, sed ni proponas la publikigadon de la loĝejoj de niaj landaj sekcioj k lokaj grupoj.

9) La interkonsento farita pri la 2-a punkto (la 6-a de nia rezolucio) valoras ankaŭ por SEU, al kiu ni rekomendas peti ĉe la koncernaj instancoj enсendpermeson por tiuj eldonaĵoj.

10) La daŭrigo de la korespondado individua k kolektiva inter laboristoj el Sovetio k tiuj el ĉiuj kapitalismaj landoj estas dezirinda k rekomendinda por la utilo de la laboristoj en la tuta mondo.

11) Por efektivigi la kunlaboron k pluajn elpaŝojn la IPE-kongreso elektas delegitojn por pritrakti parole kun reprezentantoj elektotaj de SAT.

## Plenum-Komitato de SAT al IPE

Paris, 9 Novembro 1935.

*Al Internacio de Proleta Esperantistaro*

Kamaradoj,

Ni atestas pri la ricevo de via letero de la 1. 10. 35, akompanata de « Respondo de la Antverpena kongreso al nia letero ».

Ni konstatas, kun bedaŭro, ke via respondo tute malatentas tion, kio estas reliefigita en la Gvidrezolucio, akceptita ĉe nia Pariza kongreso, nome la absolute unuecan, supertendencan k universalan karakteron de nia asocio, kiu permesas al anoj de senescepte ĉiuj tendencoj de la klasbatala laborista movado membriĝi ĉe ĝi.

Vi bazas viajn proponojn pri unueca agado sur momenta aspekto de la ĝenerala lab. movado en kelkaj landoj, sed ne en la tuta mondo. Ja en iuj landoj, la sekcioj de du Internacioj povas en siaj klopodoj por unueca fronto, ignori la ekziston de anarkistoj, sindikatistoj, ISK-anoj, sennaciistoj k. a. frakcianoj, kiuj ne reprezentas amasorganizaĵojn.

La tutmonda laborist-esperantista movado devas resti sendependa de la ŝanĝiĝema taktiko de politikaj organizoj, ĉar ĝia disvolviĝo sekvas aliajn leĝojn. La disvolviĝo de nia movado okazas ja bedaŭrinde nur malrapide, k tial ni devas trakti la problemon pli larĝhorizonte ol la politikaj organizoj, laŭ skalo ne nur *spaca* sed eĉ *tempa*. En nia movado la esprim-libero devas resti plene garantiata, k ni ne povas permesi al ni elimini el nia movado la k-dojn, kiujn celas via ekskluzivismo.

Tiu propono ne povas formi bazon por intertraktado. Ni estas deciditaj konsideri nur la interesojn de la laboresperantista movado k tial obei principojn, kiuj estas daŭre aplikeblaj en tempo k spaco, — kontraŭe al via propono, kiu havas nur ŝajnan valoron rilate la nuntempajn kelklokajn cirkonstancojn.

Ankaŭ estas neakceptebla la propono rekomende trudi al la propagandaj por-esperantaj asocioj aperigon en siaj organoj de informaĵoj pri klopodoj de tutmonda *peresperanta* kunagado, aŭ eĉ partoprenon en t. n. « unueciga komisiono ». Nia asocio estas bazita sur la principo de universaleco (tutmondeco, sennacieco) k ne kiel la via, sur la principo de internacieco. Tio signifas, ke ni ne havas la rajton miksiĝi en la aferojn de la naciaj lab. esp. asocioj, al kiuj ni ne estas superordigitaj kiel Internacio. En nia movado ekzistas klara diferenco inter POResperanta propaganda agado k Peresperanta aplika laboro. Se en la poresp-aj LEA-oj estas imagebla unueca kunlaborado por diversaj publikaj taskoj, kiel kursoj, manifestacioj, kunvenegoj, ktp... (k eĉ tiu afero, niaopinie povus solviĝi laŭ la LOKAJ cirkonstancoj), tio estas afero pritraktebla nur de la koncernaj organizoj, sed estas ekster la kompetento de la PER-esperante mondskale aganta asocio.

La de vi citita Gotenburga Konvencio konstatas ĝuste, ke « la taskoj de ambaŭ organizoj (nome por- k peresperantaj) estas malsamaj ». Nek la LEA-oj rajtas enmiksiĝi en la tutmondaj aferoj, nek ni SAT, en la LEA-aferoj. Cetere ni rimarkas, por ĝustigi eraran aserton en via letero, ke ni ne promesis, — ĉar ni ja ne rajtas promesi tiurilate, — rekomendi publikigi viajn komunikojn k. c.

En la espero, ke pli profunda ekzameno super la problemo aliigos vian komprenon pri ĝustaj principoj de plena vera unueco, ni restas pretaj fari ĉion eblan k celkonforman por realigi la kuniĝon de ĉiuj esperantaj laborfortoj.

Ni salutas vin sennacieće.

*Komisiite de PK de SAT.*

Prezidanto : *Banmer* ; Sekretario : *Barthelmess.*

## Respondletero de IPE-S

3 Decembro 1935.

*Al la Plenumkomitato de SAT.*

Gekamaradoj !

En via letero de 9. 11. 1935 domaĝe forestas kontentigaj respondoj pri la unuaj *konkretaj agoj* en nia kunlaborado.

Vi estas informitaj pri la elekto de tri niaj k-doj por la unueciga intertrakta komisiono SAT-IPE, kiu devis ekfunkcii laŭ la decido de la dua IPE-kongreso k aprobo de la ĉeestintaj SAT-delegitoj. Tamen ni ĝis nun ne havas informon pri *elekto de viaj tri reprezentantoj* en tiun komisionon k ankaŭ ne pri komenco de pli detalaj vid-alvidaj intertraktoj.

Estas evidente, ke per nuraj perleteraj traktoj ni perdos multe da valora tempo, necesa por la poŝta transporto, k ne sukcesos elimini ĉiujn eventualajn miskomprenojn. Tial ni insistas pri transigo de la ĉefa atento al la komisionaj traktoj.

Pluc, ni esprimis deziron pri partopreno de LEA-oj k aliaj internaciaj lab. esp. organizoj en la traktoj por starigi unuecan agadon k prepari unuecigon laŭ tutmonda skalo.

Tiucele ni demandis vian opinion pri la eblo vastigi la kadron de la trakta komisiono IPE-SAT al tutmonda unueciga Komisiono de lab. esp-istoj. Por helpi efektivigi tion ni petis vin konsideri la eblon rekomendi al amikaj kun vi LEA-oj aliĝi al la stariĝanta tutmonda unueca fronto.

Ni tre bedaŭras pri via duma nea respondo, kontraŭa al la esprimoj de la lastjaraj lab. esp. kongresoj, ĉu tutmondaj, ĉu landaj. Ni ne komprenas kian nepran rilaton havas via recito de teksto de la Gotenburga konvencio pri la dislimigo de per- k por-esp-aj taskoj inter SAT k la kontraktintaj LEA-oj, kun kvazaŭa neeblo *alvoki* tiujn LEA-ojn partopreni unuecajn agadojn k traktojn.

Estas ja fakto, ke la *per-* k poresp-a laboroj estas farataj laŭ*lande* k laŭ*loke,* responde al la specifaj bezonoj de la lab. movado, kiun ni ĉiuj priservas. La praktika k la propaganda k instrua laboro estas interplektitaj nedeŝireble ne nur en la IPE-organizoj, sed en ĉiuj LEA-oj k eĉ en la kvazaŭaj landaj organizoj de SAT (aŭ de SAT-anoj) kiel ekz. SATEB, SATED, ktp...

La tuta konkreta *per*esp-a laboro por la movado kontraŭ faŝismo k milito fariĝas laŭlande k laŭloke ; ĝin devos fari ĉiuj lab. esp-aj grupoj, sendepende de sia tendenco aŭ *organizaj* konceptoj.

La rolo de tutmondaj organizoj en tiu unuecfronta laboro estas disponigi siajn organojn k tribunoj al organizado de tiu laboro, al interŝanĝo de spertoj, al diskutado de tutmondaj problemoj, al kreo de bazo por unuecigo de la tuta lab. esp. movado !

La tutmondaj organizoj devas instigi k konsili tiun agadon. En tio kuŝas la senco de unueca kunagado k unuecklopodoj inter IPE, SAT k a. tutmondaj organizoj.

Ni ne povas aprobi emojn trakti la lab. espo-movadon, kiel deŝirita tempe k space, de la ĝenerala lab. movado, ĉar ni estas parto de la ĝenerala lab. movado, ĉar la ĉefa tasko k ekzistorajto de la lab. esp. movado estas *servi la aktualajn bezonojn* de la proleta agado. Tial ni devas adapti nian tutan laboron ĝuste al « la momentaj aspektoj de la ĝen. lab. movado » k se la bezonoj de la lab. movado morgaŭ aliiĝos — la lab. esp-istoj ankaŭ devos rekonstrui sian servan laboron, sian praktikon k taktikon.

Por tio ni cetere ne volas diri, ke la lab. espo-movado ne preparas valorajn kulturaĵojn k ne vartas novajn ideojn en la lingva sfero de la homaro, kiuj plene disvolviĝos en la socialisma socio.

Pri la partopreno de ĉiuj lab. tendencoj *senescepte* en la unueca agado *ne povas* estiĝi miskompreno.

Ni klare skribis en nia pasinta letero « en la unuecan organizon eventualan aŭ al unueca agado estas kompreneble allasataj lab. esp-istoj de ĉiuj tendencoj, la sola kondiĉo nur estas partopreno en batalo por forigo de kapitalismo, batalo kontraŭ milito k faŝismo, servigo de esp-o al tiuj bataloj. »

La organizoj k ties membroj, kiuj aliĝas al unueca fronto devos en la intereso de unueco, laŭ la decidoj de la SAT- k IPE-kongresoj plenumi certan minimumom da reciprokaj devoj. Kiu honeste plenumas tiujn devojn, egale de kiu tendenco, tiu estu bonvena kamarado kaj kunbatalanto, sekve neniun el tiuj k-doj ni celas elimini aŭ eliminigi — kontraŭe !

Tiuj devoj estas : ĉesigo de reciprokaj atakoj, de atakoj kontraŭ politikaj k sindikataj organizoj de la laborista klaso, de atakoj kontraŭ Sovetio en la oficialaj organoj k eldonaĵoj, k en la organizaj kunvenoj.

Atendante vian baldaŭan respondon k konsenton, ni salutas prolete k internacie.

*Komisiite de Sekretariaro de IPE* : H. Homo.

## Unuec-Komisiono de IPE al SAT

Karaj gekamaradoj !

Jam du monatojn ni atendas vian respondon al nia aldisponigo : nia unua (kaj tute klara) letero al vi datas de 13. 10. 1935, kaj ĝi estis rekomendite konfirmita al vi je 3. 11. 1935. Ni bedaŭras sincere, ke vi uzas la prokrastan metodon kontraŭ la unuiĝo de la esperantistaj laboristoj.

Ja la demando estas tute simpla. Via Asocio sendis al IPE-Kongreso proponojn kaj klarigajn delegitojn. IPE-Kongreso trastudis viajn proponojn, diskutante kun viaj delegitoj, starigis kaj aprobis, interkonsente kun via delegitaro, detalan respondon, kaj elektis trimembran komisionon Berlo, Boubou kaj Malfère, kun komisio (lasta paragrafo de la respondo) :

« Por efektivigi la kunlaboron kaj pluajn elpaŝojn IPE-Kongreso elektas 3 delegitojn por pritrakti parole kun reprezentantoj elektotaj de S. A. T. »

Jen la simpla afero : ĉu vi akceptas aŭ rifuzas kontaktiĝi kun la komisiono elektita tiucele de IPE-Kongreso, kaj kiu agas interkonsente kun IPE-Sekretariaro? T. e. ĉu vi akceptas aŭ rifuzas konsideri viajn proprajn proponojn ? Ni memorigas al vi, ke, ĉe IPE, Kongreso estas la suverena instanco : ĝi starigis la respondon k elektis la komisionon. Ĉikune ni metas novan ekzempleron de la respondrezolucio de IPE-Kongreso. Ĝi jam estis komunikita al vi de IPE-Sekretariaro, kun la konigo pri ni komisiono, per letero de 1. 10. 1935, t. e. antaŭ pli ol du monatoj.

Ni firme proponas al vi kunveni la dimanĉon, la 5-an de Januaro de la 1936-a, de la 13-a horo, kie plaĉos al vi (en Parizo). Ni atendas vian kunvokon. Bonvolu ĝin sendi al ni sufiĉe frue, ĉar unu el ni loĝas ekster la regiono.

*IPE-Komisiono Berlo, Boubou, Malfère.*

Komisiite Pierre Malfère, 15. 12. 1935.

*Noto.* — Ni ricevis de vi kun dato 13. 11. 1935, t. e. antaŭ unu monato kaj unu monaton post nia aldisponigo, kopion de polemika letero via al IPE-Sekretariaro, en kiu vi filozofias pri la propraj konsideroj, kiujn IPE-Sekretariaro kunigis al la rezolucio de IPE-Kongreso, komunikante ĝin al vi. Uzante la malŝaton, kiun esprimis IPE-Sekretariaro al la novaj grupoj, kiuj provas plinkrigi la disecon de laborista klaso, malŝaton normalan de aktivuloj el la lando de unuiĝinta laboristaro, vi elektas el la tuta komuniko (rezolucio kaj letero, — fakte nur el la propra letero de IPE-Sekretariaro kaj ne el la suverena respondo de IPE-Kongreso) tion, kio povas disigi la esperantistajn laboristojn, kaj neglektas tion, kio povas ilin unuigi. Interalie ni substrekas la decidon de IPE-Kongreso, kiu malkonstruas vian tutan polemikon (paragrafo 3-a de la respondrezolucio).

## AL ESTONTO

Mi aŭskultis tiujn kantojn de proksima jarovic'
En urbara fajraspekta, brusonora vivvortic'.
Mi aŭskultis tiujn kantojn de venonta bel-epok'
En susuro de rimenoj, en masiva ŝtala blok'.
Vidis mi : amiko mia ŝtalon forĝis kun fervor',
Kaj divenis mi aspekton de estonta hel-aŭror'.
Mi eksciis, ke mondsaĝo estas en martel-atak',
En scipovo kaj en sperto, kaj en lerto de la brak'.
Ju pli forte la martelo falos en la pista forĝ',
Des pli hele en la mondo brilos de la ĝojo torĉ'.
Ju pli vigle eksonoros la rimena harmoni',
Des pli belajn, des pli helajn, sunajn tagojn ha-
[vos ni...
Tiujn kantojn al mi kantis laŭta voĉa unison',
Da forĝistoj blubluzuloj kuraĝuloj milion'.
Tiuj kantoj estas forta bel-ribela ruĝ-sonor'
Anoncanta, ke mortiga longa dormo estas for.
Tiuj kantoj vok'potenca al la sun', al viv', batal',
Estas ja ribelo kontraŭ la malico de fatal'.

V. Kirillov.

*El la rusa* : V. Sutkovoj.

## NOTO

Pro manko de loko ni ne povas publikigi en *Sur Posteno* la duan parton de l' protokolaro de nia Antverpena Kongreso.

Se eble la tuta protokolaro estos eldonata broŝurforme.

*La Redakcio.*

# Lingvaj Demandoj

### Pri vortoj : majuskulo, minuskulo

DEMANDO : Ĉu la vortoj *majuskulo* kaj *minuskulo* estas oficialaj ? Se ne, ĉu ili taŭgas ? (K-do W. K. el Oran).

RESPONDO : Tiuj du vortoj ne troviĝas sur la vortaroj de Grosjean-Maupin (ankaŭ ne sur la « Plena Vortaro »). Ili ne estas ankoraŭ oficialaj. Sed ili estas de jam longe uzataj, sufiĉe internaciaj kaj absolute necesaj.

En ĉiuj lingvoj oni tradukas ilin ankaŭ per la formoj : grandlitero, ĉeflitero kaj malgrandlitero, litereto. Sed tiuj formoj estas neĝustaj, malprecizaj — kaj infanaj. En ĉiuj lingvoj ekzistas du precizaj teknikaj vortoj por traduki la vortojn *majuskulo, minuskulo* (majuscule, Majuskel, capital — minuscule...).

Diru al infano : Skribu grandliteron A sur la tabulo (n) ! » Tute prave, ĝi skribos *a* (grandan minuskulon), kiu ampleksos la tutan tabulon. Ekzistas tre malgrandaj majuskuloj kaj tre grandaj minuskuloj.

Kelkaj esperantistoj preferas la formojn « *majusklo* », « *minusklo* » (vidu GLEA-vortaron) por eviti la finaĵon *-ulo*, kaj sendube ankaŭ ĉar la germana lingvo uzas la vorton « *Majuskel* ». Sed la formoj « majuskulo » kaj « minuskulo » estas pli internaciaj kaj, laŭ mia opinio, la konfuzo kun *ulo*-vortoj ne estas timinda.

***

### Pri vortoj : pariao, pario, vando

DEMANDO : Kiel oni devas traduki esperanten la francan vorton *paria* ? Kiu formo plej taŭgas ? ĉu *pariao* ? ĉu *pario* ? En artikolo mi ĵus legis la formon *pario* por montri la francan *paria*. Sed sur vortaro de Grosjean-Maupin, mi legas : *pario* = paroi, cloison. (K-do W. K. el Oran).

RESPONDO : En la « Plena Vortaro » (eldonita de SAT), oni trovas sub radiko *pario* la du signifojn : *paria* kaj *paroi*. Tio ne estas la sola eraro de la SAT-vortaro en kiu oni ne trovas la jam de longe uzatajn vortojn : traŭbo, baŭmi, vinkto... sed anstataŭ ili la formojn neuzitajn : *grapolo, pranci, nito*...

La plej taŭgaj formoj esperantaj estas :
PARIAO = paria, VANDO = cloison, paroi.

Ambaŭ vortoj ne estas oficialaj.

La solaj pravigoj por formo « pario » (pariao) estus la rusa vorto *parij* (paria) kaj la vokalmulteco en la formo pariao. Sed en preskaŭ ĉiuj lingvoj, oni aŭdas la vokalon *a* (paria, pariah). Cetere aliaj vortoj en Esperanto havas tian sinsekvon de vokaloj (tiea, ĉirkaŭaj, ktp...) Nun oni preferas la formon *firmao* (anstataŭ *firmo*).

Sed la plej trafa motivo estas la jena.

Oni povas diferencigi *cloison* kaj *paroi* en tekniko kaj fiziologio. *Cloison* = *vando* (la tuto, volumeno, disiga parto). *Paroi* = *pario* (la interna surfaco). Se oni akceptas tiun diferencigon (ĝi ja estas akceptinda), nepre oni devas alpreni la jenajn formojn : *pariao* (paria), *pario* (paroi), *vando* (cloison).

M. Boubou.

# Por Laborista Esperanto-Vortaro

Karaj kamaradoj,

La Internacia sekretariaro de l'prol. Lingvo-Komisionoj (I. S. P. L. K.) decidis efektivigi la delongan revon de ĉiuj laboristaj esperantistoj : kompili riĉan, laŭeble plej kompletan, modernan, *laboristan* esperantan vortaron.

Tiu ĉi vortaro, kiu, laŭ nia projekto, devas aperi en 1937, estus belega monumento por la 50-jara jubileo de esperanto.

Tiom granda kaj grava verko estas vere taŭga nur se en la kreado de l'vortaro partoprenos nia tuta aktivularo. Ni petas vin partopremi mem k partoprenigi viajn k-dojn en tiu grandioza laboro jenmaniere :

1. Ĉiuj komuniku al ni, kiuj vortoj (elementaj aŭ kunmetitaj) mankas en la « Plena Vortaro » de SAT kaj devas enesti en la nova esperanto-esperanta vortaro ;

2. Partopreni en la analizo de l'ofteco de vortelementoj en esperanto. Tiu ĉi laboro ebligas la selekton de la plej valoraj vort-elementoj ne nur por niaj vortaroj, sed ankaŭ por la laboristaj lernolibroj de esperanto. Kvankam ĉi laboro havas sciencan karakteron, ĝin povas plenumi ĉiu elemente klera k-do. La laboro postulas *nur paciencon*, sed estas tute *simpla*. Se vi konsentas partopreni ĉi tiun laboron (punkto 2) — informu nin. Ni tuj sendos al vi konkretan taskon kaj instrukcion pri la labor-maniero.

Komisiite de ISPLK, V. Kolĉinski, Palaco de Laboro 61, *Kharkov* (Sovetio).

*Tralegu — Respondu — Transdonu al viaj Kamaradoj* !

### ĈU VI ALIĜIS AL IAREV ?

Aliĝi al IAREV povas ĉiu esperantista verkisto aŭ verkemulo, kiu deziras per la plumo partopreni en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj danĝero de imperialista milito, kaj helpi al la konstruado de socialismo. IAREV estas unuecfronta organizaĵo. Al ĝiaj vicoj povas aliĝi socialistoj, komunistoj, radikaloj, senpartiuloj, ĉiuj antifaŝistoj kaj antiimperialistoj.

Ni atendas la aliĝon de ĉiuj sinceraj antifaŝistaj esperantistaj verkistoj kaj verkemuloj. La aliĝ-deklarojn oni sendu al IAREV-centro, menciinte la nomon, adreson, profesion, aĝon, liston de verkoj (publikigitaj kaj preparataj), laŭ dezire partiecon.

Ni petas ĉiujn kamaradojn, aliĝintajn al IAREV antaŭ 1935, same alsendi al ni deklarojn de tia tipo ĉar *ni ne registras nian malnovan membraron*. Tion ĉi konsideru ĉiuj k-doj.

IAREV-anoj ne pagas ian kotizon, sed ili havas la moralan devon aboni kaj abonigi al « Internacia Literaturo ».

La abonpagon ili sendu al la admin. de « I. L. » : H. Bourguignon, *Besse-sur-Issole* (Var), Francio. Sovetianoj — al CK. SEU.

En ĉiu laborista esperanto-grupo oni abonu kaj legu la revuen « INTERNACIA LITERATURO » !

*Abontarifoj* :
Por 4 kajeroj : 10 fr. fr. aŭ 8 intern. resp. kup.
Por 6 kajeroj : 16 fr. fr. aŭ 10 intern. resp. kup.

# KORESPONDADO

### POLIO

*Laborista Gazetinformejo* funkcianta ĉe SES (Socialista Esperanto-Societo en Polio) serĉas kunlaborantojn en ĉiuj landoj. Ni volonte akceptas artikolojn kaj korespondaĵojn pri progreso de Esperanto, praktika uzado de mondlingvo por internaciaj interligoj, pri laborista vivo, eklezia, faŝista k. a. movado, ktp. Ricevitan materialon ni utiligas por nia gazeto « Lingvo Internacia » kaj ankaŭ por nialanda gazetaro. Detalajn informojn petu de k-do Wladyslaw Lekowski, Piastów kolo Warszawy, Reja 28, Polio.

# ATENTU ! !

### LENINGRADAJ DISAŬDIGOJ

Aŭskultu Esperantan Radjan Bultenon regule ĉiun ĵaŭdon je la 22.50 — 23.20 kaj dimanĉon je la 22.20 — 23.20 laŭ MET.

Ondlongeco 1224.5 m — Leningrada Radja Stacio je nomo de k-do Kirov.

### PROGRAMO DE DISAŬDIGOJ

FEBRUARO

2 — Festenas venkojn nia kolĥoza vilaĝanaro.
6 — Fortiĝas nia agema anstataŭontaro.
9 — Batalo pro alta teatra soveta kulturo.
13 — Soveta Unio estas la lando de vera civilizacio.
16 — Malaperis ursaj anguletoj en Soveta Unio.
20 — Homoj de la Ruĝa Armeo estas unuj el niaj plej ŝatataj.
23 — La festan saluton al nia ŝatata Ruĝa Armeo.
27 — Lastaj novaĵoj en USSR dum semajno (kurantaj notoj).

POSTULU LA PROGRAMOJN

Adreso por recenzoj, proponoj, ktp. :

USSR, *Leningrado, 11*, Poŝtkesto 2, Esperanto Bulteno.

# Abontarifo al " Sur Posteno "

| Lando | Monunuo | 6 ekz. | jarab. |
|---|---|---|---|
| — | — | — | — |
| Argentinio | p—p | 0.80 | 1.50 |
| Aŭstrio | ŝil | 1.10 | 2 |
| Belgio | belgo | 1.30 | 2.50 |
| Brazilio | milr | 2.80 | 5 |
| Britio | ŝil | 1/9 | 1/5 |
| Bulgario | levo | 30 | 50 |
| Ĉ. S. R. | kr. | 5 | 9 |
| Danio | kr. | 1.10 | 2 |
| Estonio | kr. | 0.65 | 1.25 |
| Finlando | mk. | 8.50 | 16 |
| Francio | fr. | 3 | 6 |
| Germanio | mkg. | 0.80 | 1.50 |
| Hispanio | pes. | 2.25 | 4 |
| Hungario | pengo | 1.10 | 2 |
| Japanio | jen | 0.80 | 1.50 |
| Jugoslavio | din. | 9.50 | 18 |
| Latvio | lat | 1.15 | 2 |
| Litovio | litas | 1.80 | 3.50 |
| Nederlando | g | 0.60 | 1 |
| Norvegio | kr. | 1.10 | 2 |
| Polio | zlot | 1.30 | 2.25 |
| Portugalio | esk | 3.70 | 7 |
| Rumanio | lej | 30 | 50 |
| Sovet-Unio | rub. | 1.60 | 3 |
| Svedio | kr. | 0.85 | 1.60 |
| Svisio | fr. | 0.95 | 1.80 |
| Usono | dolaro | 0.40 | 0.70 |

Ceteraj laŭ tarifo de Svisio

Abonpagon sendu per poŝtmandato al jena adreso : Jean Meynadier, Quartier de la Grotte des Fées, Le Gai Logis, Nimes (Gard) Francio.

Abonejo por Sovet-Unio : CK de SEU, Moskvo, Spiridonovka 15.

La abono validas nur post pago.

Neniam forgesu legeble skribi vian plenan adreson.

Imp. Coop. LA LABORIEUSE, rue J.-B.-A. Godin, 7, Nimes